FN PERANC 97

# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL

TRIMONATA BULTENO

Nº 151a PRINTEMPO 1985 ( Nº 66a nova serio )

REDAKTAS : Sro BOTTIER PIERRE 25 ALLEE DES ROITELETS 76190 YVETOT.
Eldonita, ekspedita de:
UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE C.C.P. Nº 283-40 H ROUEN.

KOTIZOJ : Minimuma kotizo = 20Fr. Subtena = ek de 30Fr.
Nur abono al Normanda Esperanta Bulteno, sen menbreco = 20 Fr.

" La Verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj.

## U.N.E. BEZONAS CIES HELPON.

La tutmonda esperantistaro sin preparas por festi la jubileon de nia lingvo. Tiu datreveno estos okazo por propagandi pli multe kaj oli konvinke ol kutime. Internaciaj kaj naciaj asocioj penas kaj aktivas por ke la jaro 1987 estu sukcesa jaro por nia afero.

Kaj ni, en Normandio, kion ni faras ? Nia nuna bilanco aspektas pli negativa ol pozitiva:

- La bulteno aperas ne regule kaj malofte
- Dum 1984, ni ne povis organizi generalan kunvenon.
- Dum 1985, nia regiona kunveno estis bone organizata en BAYEUX, sed pro ne sufiĉa partoprenantaro, okazis financa deficito.
- La aktivuloj en la grupoj estas malmultaj
- Ni devis rezigni organizadon de naciakongreso
- La estraro de U.N.E. malgraŭ kelkaj junaj vizaĝoj bezonas tutan renovigon car kelkaj estraranoj"funkcias" de pli ol dek, eĉ ĝo jaroj kaj meritas emeritiĝon.

Ni esperaske tiu situacio ne daŭros kaj ke ni sukcesos haltigi la regreson de Esperanto en nia regiono, sed ni bezonas ĉies helpon. Ne ĉiuj povas fariĝi aktivuloj sed ĉiuj devas helpi la estraron;

.../...

Polycopié par le Centre Culturel D'Esperanto D'Yvetot.
Le Gerant : Pierre BOTTIER - Depot Legal Ier trimestre 1985.

...

La estonta general kunveno de U.N?E. okazos en DOMFRONT. Niaj tieaj geamikoj jam klopodis por starigi allogan programon. Gi okazos cu la unuan cu la duan semajnfinon de oktobro. Ne diru " Ni havas tempon ...estas malproksime " sed male tuj rezervigu tiujn datojn. Ciuj Normandaj Esperantistoj devas sin mobilizi por ĉeesti la kunvenon.

Sudnormandio estas belega regiono. Komence de oktobro la vetero estas ankoraŭ bela kaj ne pluvema. La restado estos malmulte-kosta. La etoso estos simpatia. Neniu rajtas foresti. Niaj geamikoj el DOMFRONT esperas ke iliaj penoj ne estos vanaj.

I L I  A T E N D A S  N I N  M U L T O P E

V E N U ! ! !

Esperanto ja meritas unu semajfinon.

Petro KIJO.

---

RAPORTO PRI LA GENERALA KUNVENO EN BAYEUX 1984;

La estrao kunvenis sesfoje de post la pasinta kongreso en 1982. La kunvenoj okazis en la hejmoj de estraranoj. La ĉefa afero estis la eldono de la bulteno multobligita en Le Trait, ĝiaj banderoloj estas komputere presitaj La repeado de frontpaĝoj estis decidita post studado de eblaj fakturoj, komunikitaj de kelkaj membroj.

Ni kompilis adresaron de deputitoj kaj senatoroj el Normandio. U.N.E sendis al ili alvokleteron. Alie, privataj vizitoj estis deciditaj de respondeculoj de grupoj.

La parlamentanoj korepondis kun S-ro DELEHEDDE same kiel kun S-ro SAVARY tiama ministro pri edukado. Lia respondo ŝajnis al ni ne kuraĝiga.

EKSPOZICIO: Ekstera informado.
Nia komitato diskutis pri la projekto de migra ekspozicio
Eble ni povus sendi alvokon por materia subteno kaj renovigo de la titoloj.

LIBERAJ RADIOJ. Lokaj intervenoj de respondeculoj en LE HAVRE kaj ROUEN

ASOCIAJ VIVOJ. Ni salutas la naskiĝon de nova normanda asocio " Asocio de Ruena ~~Grupe~~ Cirkaŭo.

Plej parte de niaj komitatanoj partoprenis diversajn manifestaciojn
- Konvala Renkontiĝo en YVETOT (Majo 1983.)
- Jarfesto en Le HAVRE ( 13 Marto 1983.)
- Renkontiĝoj de CAEN kaj Les ANDELYS ( 24 -25an DE MARTO)
- Bonvenigo de trupo Krizalido ( ROUEN Majo 1984.)

---

POR LA VENONTA BULTENO .....

JAM PRIPENSU VIAJN

ARTIKOLOJN .....

## ESTRARKUNVENO EN LISIEUX.

15 an DE DECEMBRO

ĈEESTIS Sinjoroj Angeault, Delaunay, Michel, Nicolas, Pottier, Tailpied, Veron,

TAGORDO.

RENOVIGO DE TRIONO

de estraro. Yves Nicolas anstataŭas S-ro Jouis.
La estraro konsistas el:
Prez. Sro QUILLAUD
Sekr. Fino Sylvie Caron
Kasisto: Sro Lemarchand.
HelpKasisto: Sro P. Michel
Junularfako: Y.Nicolas.
Bultenistoj: P. Pottier kaj C.Domingo.

DEBATOJ.
Aktiveco de U.N.E. kaj U.F.E.
Rilatoj kun naciaj asocioj.
Cu gastigi grupon de aliaj regionoj ?
Jam okazis servo de naciaj asocioj
la naciaj propagandretoj mankas.
Pri Jubileo
Kion aĉeti per kaso de federacio?

KASO : 3.655 Frs.

BULTENO:

Nepre necese presi ambaŭflanke.
Propono pri nova formulo:
Trimonataj cirkuleroj kaj luksa bulteno antaŭ la kongreso.

KONGRSO.

S-ro VERON renkontis la Urbestron
Gi povus okazi komence de OKTOBRO 1985
Tranoktado en PERROU
Eblaj vizitoj : Bagnoles de L'Orne
Ekspozicio - Domfront.

---

## ESTRARKUNVENO DE U.N.E. EN YVETOT.

La estraro de Normanda Unuiĝo kunvenigis en Yvetot en domo de S-ro Pottier, la 27an de Aprilo 1985.

ĉeestis : Finoj Domingo , Caron. S-roj JOUVIN, Lemarchand, Michel, Pottier Kaj Sro Quillaud.

Pardonpetis S-ro Gibaux.

GENERALA KUNVENO.
Nia estraro studis la leteraron de Sro Veron kaj projektas ŝanĝojn por la programo.
- Prokrastigi oficialan gastigadon de la urbestro.
- pri distra vespero, ni pensas kontakti S-ro Herouet el Parizo por projekcio de filmo pri Ĉinio kaj S-ro Bergeon por kanzonista prezentado.

la dato de Generala Kunveno estas la 5an kaj La 6an de Oktobro 1985.

BULTENO. Du bultenoj estos sendotaj dum Majo kaj komence de Septembro kun aliĝoj.
Teknike estus preferinde presi ĝin duflanke.
La estraro decidas doni ĉekon por presado de la bulteno.

EN KASO. 5670 Frs.

VIVO EN LA ASOCIOJ.
ROUEN. Festo honore al honorprezidanto de Normanda Unuiĝo estos organizota La 1an de Junio 1985. Gi okazos en Junulardomo ekde la 17a Horo.
Ciu membro interesata kontaktu Ruenan Asocion.

YVETOT. Budo pri Esperanto atestos pri Yvetota vigleco. Gi okazos la 8an de Junio 1985 por manifestacio: Festo de la Asocioj.

- QUEVILLY:
La 8an de Junio 1985, budo pri Esperanto lokiĝos en teatro CH. DULLIN egido de laika amikaro.

HAVRE. La 18an de majo kaj la 19an, budo Esperanto integiĝos en prezenta de la asocioj por manifestacio " Le Havre, urbo de la Junularo kaj de la Paco, subtenita de la urbestraro kaj organizita de organizkolektivo.

Venonta kunveno de nia komitato la 16an de Junio en DOMFRONT.

---

## VIVO DE LA GRUPOJ.

LE HAVRE.

La General Kunveno okazis la 20an de Oktobro, en la kunvenejo, II rue Palfray.

La Prezidanto salutas la 17 ĉe estantojn. Antaŭ unu jaro, ni instaliĝis en ĉi-tiu ejo. Ni ĝuas ĝin precipe pro la trankvileco de niaj kunvenoj, kiuj antaŭe suferis pro granda bruo; malgraŭ la maljuniĝo de nia membraro, kun kun la konskvencaj malhelpaĵoj, la meza nombro de partoprenantoj de la " Monataj Kunvenoj " superis 15. Gratulon al ĉiuj, kaj profitu partoprenon en la diskutoj ( celo de la paroletoj) ne hezitu peti klarigojn pri la lingvo, kaj ne timu mem prezenti iun temon! Nepre praktiku : abonu gazetojn, legu la librojn de la urba biblioteko, korespondu, parolu !!

Antaŭ ol doni la parolon al nia sekretariino, ni deziras esprimi la malgajan penson de ĉiuj pro la forpaso de nia amiko Raymond Caron.

La sekretariino raportas pri la jara agado : La Monataj Kunvenoj, kerno de la strukturo de la Grupo, disvolviĝis kontentige, kaj la programo de la paroladetoj respektata. La deĵorado ( unua vendredo de l'monato) estis malpli fruktodona, kun tamen ekrilato kun la kultura Asocio de la Fervojistoj de le Havre, kies vi-prezidanto eklernas Edperanton. Kursoj: Paul MARY, kun interhelpo de Silvia, daŭrigis la kurson por la Natur-amikoj, al kiuj aldoniĝis kelkaj membroj de la grupo, kuij deziras refreŝigi sian gramatikon. Alain Chalm kiel heroo netimigeble tenas sian postenon en la Junuldomo, sed nia fako ne vekigas entuziasmon ĉe la gejunuloj ( same kiel por alialingvaj kursoj). Same per sinsteme li estas je la dispono de ĉiu esperanto-parolanto, en la liceo Porte Océane, por ekzerci en konversacio: iru al li ! Sur la proĝaganda tereno, la gazetaro aperigas sen probleme kaj regule niajn informojn pri niaj kunvenoj, kaj kelkfoje pri aliaj okazaĵoj. En klaso por adaptigo de eksterlandaj infaanoj, de Havra Lernejo, nia amiko Paul Mary prezentis Esperanton al 16 gelernantoj diversnaciaj; vigla kaj inteligenta intereso de tiuj junaj homoj... Sed ĉu ebliĝos permeso organizi ion,? regula informo pri nia ekzisto al aliaj asocioj. Nia grupo abonas jenajn gazetojn

FRANCA ESPERANTISTO
ESPERANTO
HEROLDO

Vojaĝoj kaj agado ne estis tre viglaj; la franc-germana renkontiĝo de gejunuloj ne povis okazi : ni esperu pli da ŝanco.

Nia kasistino raportas pri niaj financoj, kiuj ĝis nun ne kaŭzis problemojn, sed kiuj fariĝos pli kaj pli grava punkto de prizorgo: la komforto de propra ejo estas ŝarĝo al kiu ni ne kutimis, ĉu por humo, hejtado, ĉu por investo en materiaj plibonigoj. La ĝenerala kunveno aprobas la altigon de la kotizo al 40 Frs, laŭ propono de la komitato.

ELEKTOJ. La sama komitato estas denove elektita. La Prezidanto atentigas pri sia deziro transdoni sian postenon al alia persono, sed bedaŭrinde neniu sin decidas.

La ĝenerala kunveno finiĝas je la 18a horo, kun agrabla sekvo: aperitiva regalo !

.../...

/...

## ...TAJ KUNVENOJ.

Programo de la venontaj paroladetoj.
Novembro/ Miatobio, ĝardeni (Sino Peltier.)
Decembro: Fabeloj : Kiel interpreti tiun kulturan heredaĵon ( Silvia)
Januaro : Le Havre, nia urbo: ( laŭ prezento de kelkaj membroj)
Februaro: Surpriz-kovertoj ( Iveta)
Marto : La 7a arto ( Agnes)
Aprilo : Volapük, ĉu vi konas? ( P;Mary)
Majo : Por aŭ kontraŭ regionismo? ( J; Sery)
Junio: Teo ( L. Caron)

)=================================

## CALVADIS ? CALVADAS ? NE!... CALVADOS.

Nun ekzistas tri grupoj en nia departemento. En Caen, Herouville kaj
Bayeux.
Post la kongreso en Bayeux, kaj dank al la diversaj artikoloj en "
Ouest France " kaj " La Renaissance du Bessin " , Claude ROUGET sukcesis starigi
kurson en kiu ĉeestas ĉiu-semajne inter kvin kaj dek lernantoj. Claude regule
rilatas kun la biblioteko de Bayeux. Tiu agado, persona, pacienca, estis frukto-
dona, ĉar la biblioteko mendis kelkajn Esperantajn librojn. Kompreneble estas
pli facile propagandi por Esperanto ĉe malgranda biblioteko kiel tiu de Bayeux
ol en pli granda en kiu la kontaktoj estas pli anonimaj Sed ni ĉiuj provu !
Biblioteko estas sendube unu el la plej taŭgaj lokoj por Esperanta propagando
ĉu ne!
En Herouville St Clair ankaŭ okazas kurso kiun gvidas Yves Nicolas
Kvar lernantoj partoprenas tiun kurson, ĉiun merkredon. La grupo de Herouville
regule sendas informojn ( ekzemple " Service de Presse" de S.A.T.Amikaro) al
diversaj medioj kaj individuoj de la departemento( Ministro MEXANDEAU, bibliote-
kojn, gimnazioj, K.T.P. ...)
La grupoj de Bayeux kaj Herouville rilatas per kasedo kun Itala grupo
Tiu sona interkonatiĝo multe plaĉas al la lernantoj kaj estas kuraĝiga.
En Caen, Gilbert Angenault daŭre gvidas la kurson, sed pro sanaj kialoj
ĉijare devis malfrue komenci ĝin. Bedaŭrinde; ankaŭ pro tio la unua grada kurso
ne okazas. Sed nun nia amiko kapablas vori leonon, kaj denove nia departmenta mo-
vado povas marŝi per siaj kvar piedoj. Ne nur marŝi, sed kuri!
La tri grupoj organizis ekspoziciojn en Herouville kaj Caen, kiuj estis
okazoj de positivaj kontaktoj. En Herouville multaj loĝantoj ( 100 - 200 prok-
simume) vizitis ekspozicion, eĉ la urba konsilantaro. La urba bulteno, aperant-
ĉiu monate, bone prezentis niajn asocion kaj projektojn. En Caen, okaze de ekspo-
zicio de la " Kutura Asocio de la Fervojistoj", la budo pri Esperantointeresis
multajn inter la Mil vizitantoj. S-roj Martinet kaj Angenault deĵoris ĉiu tage,
kaj tiu konstanta sindonemo permesis renkonti la ĵunalistinon de " FR3 Radio-
Basse Normandie" kiu longe interviuis niajn amikojn kaj, la morgaŭon, dum 30
minutoj tiu regiona-radio parolis pri nia internacia lingvo.
Claude kaj Yves ankaŭ partoprenis radian elsendon ĉe Radio Cotentin
dum tri horoj. Sed ĝis nun ni ne rikoltis la fruktojn de tiuj du lastaj aferoj.
Ni provas organizi regulajn kunvenojn inter reprezentantoj de la tri
grupoj por antaŭ vidi la venontajn agadojn, por vigligi nian departementan movadon
Tiele ni projektas organizi kadre de la " Populara Universitato" ( Universite
Populaire de Basse Normandie ) Publikan kunvenon; kaj ni esperas ke S-ro Babin
kaj RANNOU ( Profesoro en la Universitato de Rennes) bonvolos prelegi. Tiu ma-
niere ni celas la profesoraron de la Universitato de Caen, kiu ĝis nun estis
malfacile kontaktebla.
Konkludo : vidu, ni ŝvitas, klopodas, batalas, por ke ĉiuj medioj pa-
rolu pri Esperanto. Sed ne sufiĉas... La kapojn kaj brakojn disponeblajn oni
facile nombrus! Ĉu ŝvitemo estu peko, Fama verkisto povus titoli : Ĉu ili pro-
pagandas ronke?? "

YVES NICOLAS.

...T.

Du kursoj malfermiĝis meze de Septembro : Elementa kurso kun 2 lernantoj, kaj perfektiga kurso kun 3 lernantoj. Ambaŭ funkcias bone sed malrapide, ĉar kelkaj lernantoj ne povas veni regule pro diversaj kialoj.

La ĝenerala kunveno okazis fine de 1984 kaj konstatis ke la kursoj bone funkciis dum la tuta jaro, kvamkam kun tro malmulta lernantaro, sed ke la grupea vivo ne estas sufiĉe vigla.

La Reĝkuka Festo okazis kun gaja etoso la 29an de Januaro, al tiu festo partoprenis proksimume 30 personoj.

La grupo kunvenas la lastan merkredon de ĉiu monato. Nuntempe la kunvenoj ĉefe celas al la preparado de publika ekspozicio, kiu okazos la 8an de Junio, en la kadro de la Festo de Asocioj.

P. POTTIER.

==============================

LES ANDELYS.

Agrabla-Kunveno En Les Andelys.

La 21an de Aprilo, la Esperanto Grupo en les Andelys estis organizinta distran posttagmezon kun prezento de teatra monologo " La advokato " ludota de Michel Audibert.

Bedaŭrinde, pro eraro, la ĉambro luita en "Maison pour tous" jam estis okupita, kaj la programo projektita ne povis okazi. Tamen, la ĉeestantoj venintaj el diversaj urboj travivis kune agrablan posttagmezon en la domo de F-ino Sylvie Bonnet, en internacia etoso, ĉar ĉeestis ne nur francoj, sed ankaŭ Japanino kaj Jugoslavino. Pro tio ili ne tro bedaŭris la programŝanĝon okazintan pro la malfavoraj cirkonstancoj.

==============================

NI FUNEBRAS. en LISIEUX.

La I4an de Aprilo, post longa kaj suferiga malsano, forpasis Sinjorino Andrée Rault.

De sia junaĝo, ŝi estis aktiva esperantistino, kaj dum sia tuta vivado aktivis por nia movado. Pro sia ĝentileco kaj afableco, ŝi estis amata kaj estimata de ĉiuj siaj konatuloj.

Al ŝia edzo ni sendas niajn sincerajn kondolencojn.

---

## ĈU VI KONAS YVETOT.?

Nia urbo estas trankvila, ĝi estas malgranda kun dek du mil loĝantoj.

Antaŭlonge, ĝi estis ĉefe agrikultura centro. De nun, estas industria.

La ĉefaj magazenoj estas situantaj apud la ronda preĝejo kiu posedas belegajn vitralojn.

Lastan militon, la urbo estis detruita, tial la centro estas nova. Ciumerkrede staras vendejoj sur la ĉefa placo. La urbo nombras du bannejojn kaj kulturan centron, junulardomon, k.t.p....

Yvetot situas je ducent kilometroj de Parizo. Hove, ne estas rivero ĉar ĝi okupas lokon supre de altebenaĵo.

Tra la regiono de Yvetot, ni povas vidi kampodometojn. Dum la bela sezono, la urbo estas agrabla kaj bele arte florita. En kortoj kreskas pomarboj.

Cu vi iam vidis florplenajn pomarbojn? Kia beleco!

Sed, ĉu vi konas la etan historion de la reĝoj, landsinjoroj kaj princoj de Yvetot? Eble, vi kantis, kiam vi estis infanoj,

" La kanto de la Reĝo de Yvetot. "

A.M. SALLIOT.

## APPEL AUX ESPERANTISTES ET AUX SYMPATISANTS
## DE LA LANGUE INTERNATIONALE " ESPERANTO "

L'Assemblée générale de notre association sera organisée par le groupe de DOMFRONT. La réunion se tiendra durant le Ier week-end d'Octobre.

Le groupe de DOMFRONT fait son possible pour que le programme soit intéressant et que pour le séjour ne soit pas voureux?. La région est ~~tr~~ très jolie et vaut la visite. L'ambiance sera sympatique.
Une réception officielle aura lieu à la Mairie de DOMFRONT.
Il importe de ne pas décevoir les organisateurs, il faut que cette manifestattion soit un succès pour l'Esperanto.
Le bureau de l'U.N.E demande à tous les amis de la langue internationale " Reservez ce week-end pour l'Esperanto "

" NOTEZ CETTE DATE DANS VOTRE AGENDA

VENEZ NOMBREUX. "

---

## NIA VENONTA KONGRESO.

Ĉi jare, nia kongreso okazos en DOMFRONT la 5an kaj 6an de Oktobre, dank'al la afableco de S-ino VERON, kiu bonvolis organizi^ĝin.

Vi trovos en tiu bulteno ĉiujn necesajn informojn pri tiu kongreso okazonta en tre bela regiono.


Ni do esperas kaj atendas vin tie. Por plifaciligi la organizadon de t-tiu kunveno, bonvolu sendi vian aliĝon antaŭ la fino de Julio al S-ro VERON ( kaj ne al Sro QUILLAUD, kiel estas erare skribite sur la aliĝilo.)

Estos ankaŭ eble tranoktadi en Centro Clairfontaine en PERROU, je 7km de Domfront. Tiukaze, alportu litkovrilojn.


Ni estos dankemaj al ĉiuj grupoj aŭ personoj; kiuj povos prezenti skeĉojn, kantojn aŭ alian spektaklon dum la distra parto.

VENU MULTNOMBRAJ.

# GENERALA KUNVENO de UNE en DOMFRONT 5an k. 6an de OKTOBRO 85




Kunvenejo: centre de CLAIRE FONTAINE
en PERROU (vilaĝo apud Domfront - 7 Km)




PROVIZORA
PROGRAMO

SABATE 5an/10/85:

11h30 Rendevuejo antaŭ urbodomo en Domfront
12h30 Tagmanĝo en Restoracio CROIX des LANDES
14h30 Vizito de la urbo
17h Rendevuejo antaŭ urbodomo en Domfront
19ª Vespermanĝo en Clairefontaine (Perrou)
20h30 Distrovespero en Clairefontaine

DIMANĈE 6an/10/85

10 Generala Kunveno en Clairefontaine
12 Komuna Tagmanĝo

ASSEMBLEE GENERALE ~~de~~ UNE. à DOMFRONT 5 et 6/10/85.

ATTENTION : Ne pas adresser le bulletin d'adhésion à P. Quillaud comme indiqué sur le bulletin mais à :

GASTON VERON

Résidence la Hamardière - 61700 DOMFRONT

accompagné du chèque à l'ordre de

GROUPE ESPERANTISTE de DOMFRONT.

(Possibilité de ne verser qu'un acompte sur la somme due.)

accompagné de :

J'arriverai au centre le samedi / dimanche vers h.

| | Nbre | PRIX | TOTAUX |
|---|---|---|---|
| cotisation d'adhésion | | 25 F | |
| Je déjeunerai au restaurant croix des Landes le samedi midi | oui / non | 50 F | |
| Je dînerai le samedi soir au centre clairefontaine j'y coucherai. j'y déjeunerai le dimanche midi | oui / non | 90 F | |
| | | TOTAL : | |

A le

signature :

Rédigez votre chèque à Union des espérantistes de Normandie CCP 283 40 H Rouen -

montant du chèque : totalité ou partie de la somme due.

Adressez ce bulletin avant la fin juillet avec votre chèque (postal ou bancaire) à Pierre QUILLAUD, 16 rue Lieutenant Vaisseau Paris, 76120 Grand-Quevilly

# BULLETIN d'ADHESION à l'AG de DOMFRONT – (LINE)

Samedi 5 et Dimanche 6 OCTOBRE 1985

Centre de Clairefontaine - Perrou - 61700 Domfront.

Mr. Mme Melle NOM : Prénom :

Adresse :

accompagné de : M.

j'arriverai au centre le samedi / dimanche vers h.

| | Nbre | PRIX | TOTAUX |
|---|---|---|---|
| cotisation d'adhésion | | 25 F | |
| Je déjeunerai au restaurant croix des Landes le samedi midi | oui / non | 50 F | |
| Je dînerai le samedi soir au centre clairefontaine j'y coucherai. j'y déjeunerai le dimanche midi | oui / non | 90 F | |
| | | TOTAL : | |

A le

signature :

Rédigez votre chèque à union des espérantistes de normandie CCP 283 40 H Rouen -

montant du chèque : totalité ou partie de la somme due.

Adressez ce bulletin avant la fin juillet avec votre chèque (postal ou bancaire) à Pierre GUILLAUD, 16 rue lieutenant Vaisseau Paris, 76120 Grand-Quevilly